

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 28.3.2012*

## Tradukoj de la ĉeĥa literaturo en aliajn lingvojn pere de Esperanto

*Miroslav Malovec*

Vi ĉiuj certe scias, ke japana esperantisto Kurisu Kei (1910-2009) enjapanigis multajn verkojn de la ĉeĥa literaturo, komence pere de Esperanto, en postaj jaroj, kiam li ellernis la ĉeĥan lingvon, kun helpo de esperantistoj. Niaj samideanoj havigis por li originalojn (li kutime kolektis ĉiujn eldonojn de la tradukata libro kaj zorge ilin komparis) kaj klarigis al li komplikajn lokojn, akiris informojn pri historiaj personoj kaj eventoj ktp. Li japanigis ankaŭ verkojn de Tibor Sekelj, Ulrich Lins kaj de aliaj aŭtoroj kaj lingvoj. Pro sia laboro li fariĝis honora membro de UEA, ĈEA kaj de Ĉeĥa-Japana Societo. El nia literaturo li tradukadis el Karel Čapek (*Milito kontraŭ Salamandroj, RUR, Blanka malsano, Rakontoj el unu poŝo, Spuroj, kelkaj memstaraj rakontoj*), Jan Drda (*Muta barikado*), Julius Fučík (*Riporto skribita en pendumila maŝo*), Karel Havlíček Borovský (*Bapto de caro Vladimiro*), Jaroslav Hašek (*Aventuroj de la brava soldato Švejk*), Arnošt Lustig (*Preĝo por Katarina Horovith, Manĝopeco*), Božena Němcová (*Avino*), Jan Neruda (*Al la patrino, Nia horloĝo, Konsolo, Kien ĝin meti*), Josef Nesvadba (*Idioto el Xenemünde*), Stanislav Kostka Neumann (*Pri batalkampo en ni*), Jaroslav Seifert (*Říp en la fenestro, Ĉe unu tombo en Olšany*), Olga Scheinpflugová (*Karanteno*), Jiří Weil (*La vivo kun stelo*), Jiří Wolker (*Soleco, Epitafo, Pilgrimanto diras al si mem*). Lia lasta traduko estis Leliček en servo de Sherlock Holmes kaj nefinita restis *Partio de modera progreso en limoj de la leĝo*. Ankaŭ mi havis honoron interŝanĝi kun li kelkajn ret-mesaĝojn rilate al tiu ĉi verko.

Sed sinjoro Kurisu estas nur la plej konata ekzemplo. Mi memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj mi interŝanĝis plurajn ret-mesaĝojn kun finna esperantisto Allan Mehtonen, kiu tradukadis en la finnan la faman libron de Eskimo Welzl *Tridek jaroj en la Ora Nordo*, kiun esperantigis Moraviaj Esperanto-Pioniroj, do plej verŝajne Josef Řebíček. Sinjoro Mehtonen demandis min pri kelkaj neklaraj lokoj en la libro, sed mi ne scias, ĉu la libro vere aperis. Dume mi perdis kontaktojn kun li, ĉar ni ambaŭ okupiĝis pri aliaj aferoj. Tamen mi sukcesis elspioni, ke en la finnan estis tradukita el Esperanto ankaŭ artikolo de Jan Havlasa *El miaj reĝaj interrilatoj* kaj de Jan Neruda *Kien ĝin meti?*, ambaŭ en la jaro 1920. Iam en la 1920-aj jaroj finna gazeto Otavanen dediĉis la tutan numeron al ĉeĥoslovaka literaturo laŭ esperantlingvaj tradukoj senditaj de Ota Ginz. En 1921 estis tradukita en la litovan lingvon *Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo* de Arne Novák, esperantigita de Vincenc Kroužil, grava membro de nia klubo. En 1929 en la litova aperis *Sankta Venceslao* de monsinjoro Hanuš, esperantigita de Bořivoj Benetka. Sed plej multaj tradukoj pere de Esperanto aperis en la ĉina lingvo, tamen la ĉina tradukinto pro la misfama kultura revolucio en la 1960-aj jaroj falis en forgeson, kvankam lia laboro estas komparebla kun tiu de Kurisu Kei. Mia celo estas revivigi memoron pri tiu persono.

Proksimume antaŭ dek jaroj mi ricevis de profesoro Novobilský plurajn skatolojn da materialoj post Tomáš Pumpr, el kiuj mi jam multajn enkomputiligis. Nun mi komencis sisteme ĉion skani, ĉar mi volas transdoni la materialojn al nia muzeo, sed nur post skanado, por ke estu eble labori per la materialoj, eĉ kiam la originaloj kuŝos en la muzea deponejo. Fine de la pasinta jaro venis vico al skatolo, kie estis korespondaĵoj de Tomáš Pumpr kun ĉina esperantisto Li Laojon, kun ministerio de kulturo kaj informado, kun akademio de sciencoj kaj Instituto por la ĉeĥa lingvo, kun Memorejo de Petr Bezruč, kun verkistino Marie Pujmanová, kun esperantistoj Ota Ginz, Karel

Kraft, František Vaněk, Oldřich Franzl kaj aliaj personoj. Montriĝis, ke ĉio turniĝas ĉirkaŭ tradukado de ĉeĥa literaturo en la ĉinan lingvon pere de Esperanto. Mi skribis pri tio al Nacia Biblioteko en Praha, tiu ligis kontaktojn al Ĉina-Ĉeĥa Societo. De tie mi ricevis respondon, ke sinjoro Li Laojon vivis inter la jaroj 1911 kaj 1989, kaj peton, ke mi verku artikolon pri tiuj tradukoj por ilia gazeto Fenix. Mi plenumis tiun peton, la artikolo espereble aperos en junio. Mia hodiaŭa prelego estas fakte bazita sur tiu mia ĉeĥlingva artikolo.

En la jaro 1952 estis nia esperantista asocio nuligita, same la gazeto Esperantista. Sed en la jaroj 1950 kaj 1951 tie ankoraŭ aperis kvar artikoloj pri tradukado de ĉeĥa literaturo en la ĉinan pere de Esperanto. Du informoj estis transprenitaj el Popola Ĵurnalo (*Lidové noviny*), konkrete, ke enĉinigitaj estis fragmentoj el Jan Neruda, Svatopluk Čech, Jaroslav Vrchlický kaj Karel Čapek (*Lidové noviny*, 26. III. 1950), kaj ke ĉeĥa kultura delegitaro gvidata de prof. d-ro Jaroslav Průšek vizitis Ĉinan Esperanto-Asociacion kaj ricevis donace novelojn kaj poemojn enĉinigitajn el esperantlingva Ĉeĥoslovaka Antologio (*Lidové noviny*, 24. II. 1951). La tria informo el plumo de Ota Ginz precizigas, ke temis pri 114-paĝan libron „Ĉe-ko-ŝi-gu-hsüan“ (Elektitaj poemoj el Ĉeĥoslovakio) kaj pri 68-paĝa libro „Ĉe-ko-hsiao-ŝuo-hsüan“ (Eletitaj noveloj el Ĉeĥoslovakio), ambaŭ tradukitaj de Kuai-Huan kaj eldonitaj de kooperativa eldonejo en Ŝanhajo. O. Ginz havas ambaŭ librojn en siaj manoj kaj listigas en la artikolo ĉiujn poemojn kaj novelojn, kiuj atingis ĉinan leganton (*Esperantista*, 15.9.1951).

Sed jam duonjaron pli frue aperis informo pri aliaj tradukoj, nome ke ĉina verkisto Li Laŭjon eldonis en 1950 libron de okcidentaj poetoj tradukitaj el diversaj fontoj. Ĝi enhavas 15 poemojn sovetiajn, 6 hungarajn, 16 bulgarajn, 6 ĉeĥoslovakajn, 2 rumanajn, 2 grekajn, 6 turkajn, 4 francajn kaj po unu el Nov-Zelando, Hispanio, Anglio kaj Usono. El ĉeĥaj poetoj estas reprezentitaj Bezruč, Sova, Halas, Pič kaj Pánek. La libron ricevis ĉeĥa plum-amiko de la tradukinto, esperantisto Karel Kraft el Příbram (*Esperantista*, 20.2.1951).

La informo vekis intereson de Tomáš Pumpr ne nur tial, ĉar la poemojn de Sova kaj Halas en la menciita antologio tradukis li mem, sed ĉar li estris literaturan komisionon de esperantista organizo kaj klopodis katalogigi ĉion, kio estis tradukata. Plie li volis prizorgi kopiojn por Memorejo Petr Bezruč en Opava. Li skribis al Karel Kraft, ĉu li ne povus prunti alian ekzempleron de la verko, ĉar li sciis, ke unu ekzemplero jam estis pruntita por migra ekspozicio de hungara literaturo, ĉar sur la kovrilo estis portreto de Petöfi. Kraft respondis, ke li ne havas alian ekzempleron, sed donis al li adreson de Li Laojon kaj samtempe sendis al li kopion.

Post du semajnoj (6.5.1951) venis respondo el Ĉinio, ke la libro „Juĝo“ estas jam disvendita, sed dua eldono estas preparita. Li ĝojas, ke li konatiĝis kun la tradukinto de Sova kaj Halas kaj esperas pri plua kunlaboro. Li skribas pri si mem, ke li estas literatura redaktoro de gazeto Tientsin Rhbao, organo de urba komitato de komunista partio en la urbo Tientsin, plie li dediĉas sin al verkado de poezio kaj prozo kaj estas membro de komisarejo de Tutĉina Esperantista Ligo, fondita antaŭ du monatoj.

Li Laojon sciis ankaŭ angle, france kaj ruse, sed ne germane, do parte li tradukadis ankaŭ pere de tiuj ĉi lingvoj. Li komencis studi la ĉeĥan lingvon en privataj lecionoj de Xenie Dvorská, ĉeĥa studentino, kiu en Ĉinio studis la ĉinan lingvon kaj ĝian literaturon, kaj Tomáš Pumpr klarigadis al li nebone kompreneblajn tekstojn. Tomáš Pumpr por li faris precizajn laŭvortajn tradukojn de *Sileziaj kantoj* de Petr Bezruč, *Kantoj de sklavo* de Svatopluk Čech, *Torso de espero* de František Halas, *Bapto de caro Vladimir* kaj *Reĝo Lavra* de Karel Havlíček Borovský, *Bukedo* kaj *Fabeloj* de Karel Jaromír Erben. Ota Ginz simile faris tradukojn de *Ĉina rideto* de Marie Pujmanová, František Vaněk fragmenton el *Krakatit* de Karel Čapek kaj Oldřich Franzl tradukis el Neruda, Čelakovský, Šolc kaj Mayer. Miloš Lukáš kaj Imrich Zálupský (slovaka ĵurnalisto) esperantigis *Mutan barikadon* de Jan Drda kaj sendis ĝin al s-ro Hon-fan, redaktoro de gazeto *El Popola Ĉinio*. Tiu transdonis ĝin al Li Laojon, kiu la verkon enĉinigis kaj eldonis. Plie li sendis la manuskripton al Kurisu Kei, kiu laŭ ĝi faris japanan tradukon. Ambaŭ tradukoj aperis en 1956.

*Ĉina rideto* aperis en 1957, *Kantoj de sklavo* en 1960, sed la *Sileziaj kantoj* nur en 1983, post la morto de Pumpr, kvankam la tradukisto jam ĉirkaŭ 1960 plurfoje anoncis, ke la traduko estas finita kaj sendita al presejo. Li mem ne komprenis, kial la libro ne aperas, kvazaŭ la libron sabotus

iu sekreta malamiko. Li Laojon sukcesis en gazeto publikigi nur eseon pri Petr Bezruč kun ses liaj poemoj. Li ankaŭ tre sopiris traduki Ŝvejkon, sed tiun pere de la angla tradukis verkisto Ŝiao-Ĉian. Li Laojon enĉinigis por la dua eldono antaŭparolon de Zdeněk Ančík laŭ esperantlingva traduko de Ota Ginz.

Li ankaŭ deziris eldoni trivoluman antologion de ĉeĥa poezio. Pri tiu projekto kunlaboris ankaŭ ministerio de kulturo, akademio de sciencoj kaj instituto por la ĉeĥa literaturo. Ili akiradis por Li Laojon ĉeĥlingvajn originalojn kaj ankaŭ tradukojn en la angla, franca aŭ rusa, se ili ekzistis. Li Laojon proponis jenajn tri volumojn: De Thám al Machar, de Bezruč al Pilař, de Kainar al Ŝiktanc. D-ro Mojmir Otruba el instituto por la ĉeĥa literaturo proponis modifon: 1. Thám, Puchmajer, Ruchanoj kaj Lumíranoj (Vrchlický, Sládek, Zeyer, Ĉech); 2. Ĉeĥa moderno (Machar, Sova, Nezval, Wolker, Seifert, Biebl, Halas); 3. Hrubín kaj nuntempuloj.

Kiam Li Laojon ricevis konsenton de ŝanhaja eldonejo, ke ili eldonos la tri volumojn, d-ro Otruba konkretigis la unuan volumon: Thám (*Život venkovský*), Puchmajer (*Vlk a jehně*), Rukopisy (*Kytice, Opuštěná, Žežulice, Jelen, Zbyhoň, Záboj a Slavoj*), Kollár (*Láska, Milá, Národ, Život ze Slávy dcery*), Čelakovský (*Jízda k milé, Dobré naučení, Pocestný, Dětská, Po práci, Zmizelá radost, Toman a lesní panna*), Erben (*Zlatý kolovrat, Holoubek, Vodník, Vrba, Dceřina kletba*), Mácha (*1. a 3. zpěv Máje*); Havlíček (*Křest sv. Vladimíra, Král Lávrá*), Neruda (*Matka, Před fortnou Milosrdných, Dědova mísa, z Písni kosmických, Polka, Jarní, Letní, Podzimní, Zimní, Moje barva, V zemi kalicha, Láska, Jen dál, Všim jsem byl rád*), Hálek (*Přilítlo jaro z daleka, Napadly písňe v duši mou, Já laňku vidím za šera, Den májový jak ze zlata, Dražba*), Mayer (*V poledne*), Šolc (*Píseň o ruce mozolné*), Ĉech (*Podzemní hlas, Sekáči, Nadšení*), Sládek (*Rodné mluvě, Není-li pomoci, Hlavy vzhůru, Přání, Štěstí, Práce, Je proti nám, Ať velcí toho světa, Na hrobech indiánských, Tráva*), Vrchlický (*Causerie jarní, Za trochu lásky, Rád věděl bych, Hudba v duši, Meč Damoklův, Savitri, Nocleh, Píseň o lidské touze*), Zeyer (*Odřikání, Koroptev - Borovice*).

Sed la kultura revolucio la projekton likvidis, de Li Laojon eĉ ĉesis alvenadi leteroj. Lastan leteron el 1962 akompanis gazeto Xingang (11/1962) kun kvar tradukoj el Neruda (*Matičce, V sobě jen a mlčky nesu, Ukolébavka vánoční, Jen dál*) kaj informo, ke Li Laojon ĵus transdonis al eldonejo Bukedon de Erben.

En 1959 Li Laojon sendis al Pumpr ĉinajn tradukojn de Avino (B. Němcová), *Sakfajfisto de Strakonice* (J. K. Tyl), *Ŝtorma jaro 1905, Leviĝos novaj batalantoj, Ruĝa brilo super Kladno* (A. Záúpotocký), *Ludo per fajro kaj Homoj sur krucvojo* (M. Pujmanová). Sed ne estas klare, kiu ilin tradukis kaj el kiu lingvo. Li Laojon plue informas, ke en la gazeto Xin Guang aperas lia traduko *Okupo de Nordo Poluso* de Julius Fučík. Li intencas traduki eseon de Fučík *Pri ĉeĥa literaturo*, libron Dekunuo de Klapzuba, rakontojn de Hašek, ion el Jirásek kaj romanon Romeo, Julieta kaj tenebro de Jan Otčenášek.

Pri kelkaj tradukoj aperis informo en *Literární noviny*. Familioj de Tomáš Pumpr kaj Li Laojon interŝanĝis ankaŭ plurajn fotografiojn, do ni scias, kiel sinjoro Li Laojon aspektis. Fine ankoraŭ malgranda klarigo. Li mem subskribis siajn leterojn Li Laojon, sed lia ĉina ideogramo ebligas plurajn aliajn variantojn, tial lia nomo aperas ankaŭ en formoj *Li Laujon - Li Laojon - Fang Žung - Li-Laojan - Li Lao-žung - Lao Ron - Li Laoron - Likisi Takin*.





